Informilo de Baltaj Esperanto-Tagoj , BET-52 en Birštonas, Litovio

# Balenido

Sabato, la 2-a de julio 2016 *N-ro 1*

## Salutmesaĝo de la Alta Protektanto



### Estimataj partoprenantoj de Baltiaj Esperanto-Tagoj!

Historio atestas, ke Litovio estas grava lando ne nur por esperantistoj de la Baltaj landoj, sed ankaŭ por ĉiuj entuziasmuloj de ĉi tiu lingvo. Ĉar nome ĉi tie iam loĝis la aŭtoro de Esperanto Ludoviko Zamenhof. Tial oni povas diri, ke en ĉiu esperantisto estas iom da litoveco.

Esperanto estas gepatra lingvo de neniu nacio, tamen la ideo de ĝia kreinto restas aktuala ankaŭ en la nuntempa vivo. Ja la ĉefa misio de ĉi tiu lingvo estas detrui la murojn inter la popoloj, helpi al ili interkompreniĝi kaj komunikiĝi. Tial Esperanto ludas vere gravan rolon en la tuta mondo, plena de intensa komunikado.

Estas neniu dubo, ke la longtradicia kunlaboro de esperantistoj el Latvio, Estonio kaj Litovio plivastigas la kampon de kunlaborado, stimulas la reciprokan ekkonon. Mi estas certa, ke Baltiaj Esperanto-Tagoj en Birštonas plivivigos kaj plifortigos la amikecajn ligojn.

Karaj baltlandaj esperantistoj, mi kore deziras al vi interesajn diskutojn, sencoplenajn solvojn kaj grandan sukceson en popularigo de ĉi tiu universala lingvo.

Ĉefministro de Litovia Respubliko
**Algirdas Butkevičius**

## Programo

### La 1-a de julio (vendredo)

**10.00 – 22.00** Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (Administrejo)

### La 2-a de julio (sabato)

**09.00 – 22.00** Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (Administrejo)
**13.00 – 14.00** Tagmanĝo (memstare)
**18.00 – 19.00** Vespermanĝo (memstare)
**19.30 – 20.00** Komuna organiza kunveno de BET-anoj (Ĉefsalono)
**20.00 – 21.00** Eventuala koncerto (Ĉefsalono)

### La 3-a de julio (dimanĉo)

**08.00 – 09.00** Matenmanĝo (Manĝejo)
**09.00 – 10.00** **Organizaj kunvenoj** de la gvidantoj, vizitantoj kaj prelegantoj de ĉiunivelaj kursoj, Somera Universitato kaj aliaj konstantaj programeroj (Ĉefsalono)
**10.00 – 11.00** **Somera Universitato.** Prof. Aloyzas Gudavičius: La unua prelego el la prelegciklo pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (Ĉefsalono)
**10.00 – 11.00** **Somera Universitato.** Prof. Ilona Koutny: Esperantlingva bildo de la mondo en salono de la gastejo “Birštono tulpė” (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
**10.00 – 11.30** **La unuaj lecionoj** de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
**11.30 – 13.00** **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
**13.00 – 14.00** **Tagmanĝo** (Manĝejo)
**15.00 – 16.00** **Solena inaŭguro de** BET-52 (Kulturcentro)
**16.00 – 17.00** **Nacia vespero:** koncerto de urbaj kulturaj ensembloj (Kulturcentro)
**18.00 – 19.00** **Vespermanĝo** (Manĝejo)
**20.00 – 21.00** **Koncerto.** Prof. Jerzy Dobrzyński (Varsovia Muzika universitato ) ludas kaj komentas verkojn de Fryderyk Franciszek Chopin (Kurhauzo, B. Sruogos 2)



Balenido1.indd 1 01.07.16 12:31

# Salutmesaĝo de Mark Fettes



**Karaj amikoj en BET-52,**

Daŭripoveco estas multe diskutata nuntempe, ĉu sur la kampo ekonomia, ĉu temas pri protekto de la naturo, ĉu pri socia justeco. Sed via aranĝo prezentas tiel frapan kazon de daŭripovo, ke ĉiu diskuto estus vana! Simple estas evidente, ke internacia aranĝo tiel longviva devas respondi al profunda bezono, radika en la ideo mem de internacia lingvo. Mi ŝatas pensi, ke la familioj Zamenhof kaj Zilbernik, se la historio irus pli mildan vojon, estus regulaj partoprenantoj en la Baltiaj Esperanto-Tagoj, lokitaj kvazaŭ sur ilia hejma grundo.

Kaj vidu, kion ili povus ĝui! "Tradician programon," laŭ la informilo – kio signifas veran bankedon de programeroj artaj, distraj, klerigaj, movadaj, sportaj kaj aliaj. Malmultaj movadoj, mi kredas, povus proponi al siaj anoj tiel riĉan sortimenton, jaron post jaro. Se UEA tion sukcesas fari en la Universalaj Kongresoj, tio estas kun la helpo de profesia organiza teamo en la Centra Oficejo – sed BET sukcesas per nur volontulaj fortoj, en nombroj signife pli malgrandaj. Kaj tio montras, de kie fontas tiu daŭripovo, al kiu mi aludis – el la nevenkebla persistemo de la baltianoj, kun oni rimarkas ne nur en la Esperanto-movado, sed sur multaj aliaj kampoj de la socia vivo.

Vi estas modelo kaj inspiro por esperantstoj tra la mondo. Ĝuu la tagojn en Birŝtonas! Kaj samtempe ne forgesu, kiel diris Zamenhof en sia demisia parolado en Krakovo, "ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo." La daŭripovo interna estas esenca, sed la pli vasta mondo ege bezonas novajn vojojn al sia propra daŭripoveco. Mi esperas, ke viaj diskutoj kaj organizaj kunsidoj helpos kunkonstrui iujn el tiuj vojoj.

**D-ro Mark Fettes**
Prezidanto
Universala Esperanto-Asocio

# Pri pramoj por la partoprenantoj de BET-52

Por oportuneco de la partoprenantoj de BET-52, kiuj loĝos en la somerumejo „Birštono Nemuno Vingis" sur alia flanko de rivero Nemunas, la organiza komitato luis pli grandan privatan pramon „Justina", kiu dufoje tage transigos la partoprenantojn sur alian flankon kaj reen. En „Birštono Nemuno Vingis" loĝos ĉirkau 70 BET-anoj. La pramo „Justina" unufoje povas preni 40 homojn. Tiu-ĉi pramo por BET-anoj estos senpaga, pro ĉio pagos la organizantoj. Ĝi komencos funkcii ekde la 3-a de julio (dimanĉe). Sabate (la 2-an de julio) oni uzu municipan pagatan pramon „Birštonas". La pramo „Justina" navigos ekde kajo situanta kontraŭ la sporta bazo de Litovia sporta universitato (Birutės str. 19).

Do, la pramo „Justina" (sur la bildo) matene ekde kajo proksime de somerumejo „Birštono Nemuno Vingis" al BET-ejo forveturos je la 07.00 por la unua grupo, por la dua grupo je la 07.30.

Vespere la pramo „Justina", ekde kajo situanta kontraŭ la sporta bazo de Litovia sporta universitato al somerumejo „Birštono Nemuno Vingis", forveturos je la 22.00 por la unua grupo kaj je la 22.30 por la dua grupo.

Ankaŭ estas uzebla municipa pagata pramo „Birštonas", kiu navigas ekde kajo situanta kontraŭ la sanatorio „Tulpė" al Kampiškių str. sur la alia flanko de



la rivero „Nemunas" (kie estas somerumejo „Birštono Nemuno Vingis", tie loĝos parto de la partoprenantoj de BET-52) laŭ jena horaro :

**Dum laboraj tagoj:** 07.30; 08.30; 09.30; 12.00; 12.30; 13.30; 14.00; 17.30; 18.30; 19.30; 20.30; 21.30

**Dum semajnfinoj:** 08.00; 09.00; 10.00; 11.00; 12.00; 13.00; 14.00; 17.30; 18.30; 19.30; 20.30; 21.30

**Reen de la Kampiškių str. ĝis la kajo kontraŭ la sanatorio „Tulpė" la pramo navigas laŭ jena horaro:**

**Dum laboraj tagoj:** 07.40; 08.40; 09.40; 12.10; 12.40; 13.40; 14.10; 17.40; 18.40; 19.40; 20.40; 21.40

**Dum semajnfinoj:** 08.10; 09.10; 10.10; 11.10; 12.10; 13.10; 14.10; 17.40; 18.40; 19.40; 20.40; 21.40

Prezo de la pramo al unu direkto estas unu eŭro. En la pramon samtempe povas eniri 12 personoj.



Balenido1.indd 2 01.07.16 12:31

# Instruado dum BET

**En 52-a BET ĉiutage okazos kursoj de Esperanto. Eblos elekti inter 4 niveloj kaj estos granda elekto de kursgvidantoj, ĉar eĉ 8 instruistoj pretas gvidi kursojn de diversaj niveloj. Ni antaŭvidas tiajn nivelojn:**

① **Veraj komencantoj** lernu en A1.

② **Komencintoj**, kiuj jam iom lernis Esperanton, scias la ofte uzatajn vortojn, kapablas kunmeti simplajn frazojn kaj legi simplajn tekstetojn elektu nivelon A2.

③ **Progresantoj** kiuj jam povas elturniĝi en la ĉiutaga konversacio, sed sentas mankon de vortoj kaj volas praktiki la lingvon estas atendataj en la nivelo B1.

④ **Progresintoj** – tiuj kiuj jam delonge lernas Esperanton kaj komprenas kiam legas diversajn tekstojn, sed malofte havas la okazon paroli Esperanton, aŭ malkuraĝas tion fari, estas atendataj en paroliga kurso B2.

Komence de BET ni afiŝos sur la anonctabulo „memtaksilon“, laŭ kiu ĉiuj kursanoj povos indiki sian nivelon kaj elekti la grupon. Jam sabate aŭ dimanĉe matene legu tiun dokumenton kaj decidu en kiuj kursoj vi volas partopreni.

Dimanĉe, la 2-na de julio, ĉiuj kursemuloj kaj kursgvidantoj renkontiĝas je la 09.00 en la ĉefsalono de la administra domo de Versmė kaj tie ni disdividos la grupojn. Je la 10.00 jam en gimnazio ni komencos kursojn.

La kursoj okazos antaŭtagmeze kaj lernemaj kursanoj povos ĉeesti en du malsamaj grupoj, ĉar unu gvidanto laboros inter 9.00 -10.30, alia inter 10.45-12.15.

## Kiuj instruos?



Ŝatata instruisto por komencantoj, kiel jam estis en kelkaj BET, denove estos **Stano Marĉek** de Slovakio, kiu instruos per sia propra tre konata „Esperanto per rekta metodo“.



Komencintojn kuraĝigos kaj instruos la litova esperantistino, Cseh-instruistino **Aida Čižikaitė**, kiu lastatempe nome tian nivelon instruas al litovaj gejunuloj. Tamen por litovoj de tiu nivelo ni rekomendas eksterlandan



instruiston, ĵurnaliston kaj aktivulon **Abdurahman Junusov** de Dagestano, ja lernado kun eksterlandano ofte estas pli ekscita kaj paroliga.

Progresantojn pli progresigos du famaj instruistoj, jam konataj por BET partoprenantoj: **Nina Petuchovska** de Pollando kaj **Mikaelo Lineckij** de Ukrainio. En ambaŭ grupoj



atendas serioza laboro, sed ofte en gaja maniero. Por tiuj progresintoj, kiuj ĉefe bezonas paroligan kurson, ni havos du tre spertajn instruistinojn: **Svetlana Smetanina** kaj **Irina Gonĉarova** de Rusio. Svetlana kiel bonega instruistino jam estas konata al fidelaj BET-partoprenantoj kaj Irina ankaŭ estas sperta instruistino kiu pli da atento donos al la gramatikaj demandoj kaj ekzercoj. Krom matenaj lecionoj kun kelkaj instruistoj ni planas kelkfoje organizi postagmeze horetojn de ludoj kaj kantado por gejunuloj, kiujn seriozaj prelegoj eble ne tre altiros.

**Gražina Opulskienė**

# Gravaj atentigoj



❶ **Organiza komitato** de BET-52 estas en **Administrejo** (B. Sruogos str. 9), en kunsida saloneto apud la direktora ĉambro 200, sur la dua etaĝo.

❷ **Libroservo** funkcias ĉiutage en salono de Odontologia kliniko (B. Sruogos str. 6).

❸ **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** funkcias ĉiutage en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29), n-roj 24, 25, 26, 28, 29 (sur la dua etaĝo), 45, 47 (sur la tria etaĝo).

❹ **Komputila klaso** n-ro 51 (sur la tria etaĝo) kun multaj komputiloj kun retaliro, uzebla por ĉiuj partoprenantoj de BET-52, estas en la urba gimnazio (str. Kęstučio 29).

❺ **Manĝejo** (ekde matenmanĝo dimanĉe la 3-an de julio) estas en salono n-ro 2 en konstruaĵo B. Sruogos str. 6 sur la dua etaĝo.

❻ **Kurso de prof. Ilona Koutny** funkcios ĉiutage en salono de la gastejo „Birštono tulpė“ (Birutės str. 21) sur la tria etaĝo.

❼ **Ĉiuj vesperaj programeroj** okazos en Kurhauzo (B. Sruogos str. 2).

❽ **Kelkaj prelegoj kaj eventuale aliaj programeroj** okazos en salono de gastejo de Litovia sporta universitato (Birutės str. 19).

❾ **Urbestra akcepto** por invititoj okazos la 8-an de julio (vendrede) je la 17-a horo en la restoracio „Sonata“ (Algirdo str. 34 ), en centra urba parko. Invitilojn bonvolu ricevi en la akceptejo.

**Organiza komitato**



Balenido1.indd 3 01.07.16 12:31



# Piana koncerto de Jerzy Dobrzyński

**Birštonas, la 3-a de julio 2016:**

**Jerzy Dobrzyński, emerita profesoro de kapelestroj, Varsovia Muzika Universitato.**

**Malfermo:** Michał Kleofas Ogiński -> 1765 +1833
Polonezo a-moll, konata kiel Adiaŭo al Patrujo
Fryderyk Chopin -> 1810 +1849

1. Polonezo g-moll
2. Cantabile B-Dur – postmorta eldono datita 1934
3. Largo Es-Dur – postmorta eldono datita 1847? (Preludioj komponitaj ekde 1836 ĝis 1839)
4. Preludium C-Dur Nr 1 – Denova kunligo
5. Preludium G-Dur Nr 3 – Arto kiel la Mondo
6. Preludium h-moll Nr 6 – La sono de kariliono.
7. Preludium: A-Dur Nr 7.
8. Preludium c-moll Nr. 20 – La funebra marŝo
9. Preludium Des-Dur Nr. 15 – La pluva
10. Mazurko C-Dur Nr 3 Opus 67
11. Mazurko g-moll Nr 2 Opus 67
12. Mazurko F-Dur Nr 3 Opus 68
13. Mazurko a-moll Nr 4 Opus 67
14. Mazurko B-Dur Nr 1 Opus 7
15. Valso As-Dur – dediĉita al Emilia Gaillard
16. Valso a-moll – postmorta eldono
17. Valso h-moll Nr 2 Opus 69.




KD Jerzy Dobrzynski: *Piano Concerto in A Flat Major*

## Saluton, karaj BET-anoj!

Kiel en ĉiuj **Baltiaj Esperanto-Tagoj**, ankaŭ dum BET-52 en Birštonas aperos la ĉiutaga gazeto, ĉi-jare kun la nomo ***Balenido*** (la klarigo apude). Vi trovos en ĝi aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-52, fotojn k.s. Ĝia enhavo dependos ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj, ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com.* Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel priBETaj anekdotoj kaj rakontoj. Ĉiuokaze bonvenon al Birŝtonas, kaj ĝuu la 52-an BET-on! **Stano Marček, redaktoro**

# Kial "Balenido?"



Kuracloko Birštonas famas pri mineralaj akvoj Vytautas kaj Birutė. Antau milito la fonton de mineralakvo Vytautas indikis malgranda statueto de balenido. Sed kiam estis konstruita Kaŭna Hidroelektra centralo kaj leviĝis akvonivelo en Nemunas, la balenido subakviĝis. Tiutempe Birštonas ne havis propran blazonon. Ĝin kreis artisto Arvydas Každailis kaj en la jaro 1995 konfirmis la prezidento de Litovio. La blazono prezentas oran fiŝon – balenidon, el kies kapo ŝprucas arĝenta akvo – simbolo, sur kiu baziĝas paseo kaj futuro de Birštonas.

**Petras Čeliauskas**






Balenido1.indd 4 01.07.16 12:31